# *Kubo kondamnas atakon kontra? usona prezidenta kandidato*



Havano, jul 14 (RHK) La unua sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo kaj prezidento de la Respubliko, Miguel Díaz-Canel Bermúdez, kondamnis la perforton, al kiu estis submetita la respublikana prezidenta kandidato Donald Trump en Usono.

"Kiel viktimoj de atakoj kaj terorismo dum 65 jaroj, #Kubo ratifas sian historian pozicion de kondamno de ?iuj formoj de perforto", skribis la prezidento en sia konto en la socia reto X.

"La armila komerco kaj la eskalado de politika perforto en #Usono kondukas al incidentoj kiel tiu, kiu okazis ?i-sabate en tiu lando," diris Díaz-Canel.

Samsence parolis la kuba ministro pri eksteraj aferoj, Bruno Rodríguez Parrilla.

Ni kondamnas la atakon kontra? eksprezidento Donald #Trump kaj malakceptas la perfortan agon faritan en #Pensilvanio, afi?is la Ministro pri Eksteraj Aferoj.

La kandidato por la prezidanteco de Usono, respublikano Donald Trump, estis vundita de pafo meze de parolado en kampanja mitingo en Butler, kampara areo de Pensilvanio.

---

[https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/360018-kubo-kondamnas-atakon-kontrau-usona-prezidenta-kandidato](https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/360018-kubo-kondamnas-atakon-kontrau-usona-prezidenta-kandidato)

# Radio Habana Cuba